


# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

merkredon, la 2-an de Julio, 2014 • numero tri

## Kio okazos hodiaŭ?

★ 9 atm –  
12:30 ptm:  
Kursoj



★ 3:00 – 4:00 ptm  
Student Union  
Upper Lounge

Niko parolos pri hiperteksto kaj informo-mastrumado. (Vidu la priskribon dekstre.)

★ 4:00 ptm – iam  
Student Union Upper Lounge

Tuj post la posttagmeza programo, Steĉjo SCHWICHOW instruos kiel mediti. Tiuj, kiuj interesiĝas pri meditado, parolu kun li.

lastminuta aldoni!

★ 7:00 ptm – 8:00 ptm  
Student Union Upper Lounge

Davido prezentos pri la ceremonio de *Temazcal*, aŭ ŝvit-kabanoj. (Priskribo dekstre!)

## La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 203

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:

<nask.esperanto@gmail.com>

## Ni bezonas elektronikajn idealistojn Plibonigi la homaran intelekton per teknologio

De Miko KUIJN


Dum la sesdekaj jaroj du esploristoj memstare antaŭvidis la eksplodontan haveblecon de komputila teknologio kaj ekdisvolvis forte idealisman idearon pri la utiligo de tiu teknologio por la plibonigo de la homaro per plifortigo kaj plivas-tigo de ĉies intelekta kapablo.

Douglas ENGELBART (kiu inventis la komputilan muson) disvolvis vastan teorion pri teknologia intelektosubteno kiu naskis imponan sistemon kiun li mem uzis por rapidigi sian propran esploron.

Teodor NELSON emfazas la internan interligiĝon de teksto, interalie en edukaj teksto kaj litera-

turo. Li vidas multajn eblajn plibonigojn en la kampo de edukado kaj memsprimo helpe de komputiloj, sed neniam sukcesis praktikigi ilin. Tamen li volonte plendas pri la nuna stato de la rilato inter homoj kaj komputiloj.


Mi volas starigi la demandon: nuntempaj komputiloj estas rapidaj kaj belaspektaj, sed ĉu ili vere helpas niajn intelektajn en la vasta kampo de la ĉiutaga vivo?



Kiel aspektis la unua komputila muso. (Foto de Vikimedia.)

## Temazcal: kabanoj por ŝviti

de David López RUEDA



Desegnaĵo de *Temazcal* en azteka manuskripto de la 16-a jarcento. (Foto de Vikimedia.)

*Temazcal* (pronco: temaskal') kiu signifas "kabano por ŝviti" estas reprezento de la unua loko kie ni estis kiam ni alvenis al la tero, la patrino utero. Ĝia uzo kiel parto de saniga terapio aŭ kiel terapio mem komen-cigiĝis antaŭ miloj da jaroj en Norda-meriko. En lokoj de Meksiko kaj Usono restas homoj kiuj gardas la tradiciojn kaj sciojn por havigi la ceremonion de *Temazcal*. Mi, meksikano kiu multe interesiĝas pri tradiciaj metodoj por sanigo kaj sanigo, montros al vi rigardeton pri ĉi tiu vasta temo.

# Nova Esperanto-Grupo en Ohio, Usono

de Warren HUNT

Nova grupo pri Esperanto nun ekzistas en Usono. Ĝia unua kunveno okazis en Temperance, Miŝigano, apud la urbo Toledo, en nordokcidenta Ohio. La grupo konsistas el kvin membroj. Ĝi kreskis el prezento pri Esperanto de Warren HUNT, emerita instruisto pri la germana lingvo, en Aprilo dum la Internacia Festivalo ĉe la Universitato de Toledo. S-ro Hunt, kiu pasintjare unuafoje ĉeestis NASK-on, instruis en Majo senkoston, enkondukante kurson de Esperanto. Ĝi konsistis el kvar sesioj. Poste, la kvar lernantoj kaj s-ro Hunt decidis krei esperantan klubon. “Mi interesiĝis pri Esperanto ekde infanaĝo, sed ne vere eklernis ĝin ĝis 2010. Post mia emeritiĝo, mi decidis iĝi esperantisto, kaj alporti la lingvon al mia komunumo.”

Ĉe la unua kunveno, la grupo legis, tradukis, kaj preparolis plurajn alineojn el esperantlingva novelo. Ili ankaŭ ludis Skrablon kaj spektis vidbendan lecionon el *Pasporto al la Tuta Mondo*. “La vidbendo estas bonega por lerni Esperanton” diris Burley CHANNER, emerita profesoro de germanistiko kaj longtempa kolego de s-ro Hunt. S-ro Channer tre ŝatas la simplecon, la ordecon kaj la klarecon de la strukturoj de Esperanto. “Je ĉiu kunveno de nia malgranda Esperanto-klubo ni tre amuzas nin! Ankaŭ estas tre interese la ebleco havi gastojn kaj esti gasto ĉe aliaj esperantistoj en la tuta mondo!”

Nova membro, Jasmine TOWNSEND, postdiplomstudentino ĉe la Universitato de Toledo, eksciis pri Esperanto ĉe la Internacia Festivalo, kaj prezentis sian

propran tradukon de sveda kanto. “*Pasporto al la Tuta Mondo* estas bonega ilo por lerni”, diris fraŭlino Townsend, kiu volas travojaĝi la mondon kaj paroli kun personoj el diversaj landoj. “Ĉe la retpaĝaro de *Lernu!* mi parolis Esperante kun personoj el Svedujo, Japanujo, Finnlando, Alĝerio, kaj Rusujo. Mi pensas, ke ĝi estas amuza lingvo, kaj kun ĝi, mi povas eble travojaĝi la mondon.”

La plej sperta membro de la grupo estas s-ro Jack GOODHAND, emerita vicŝerifo de Toledo, Ohio, kiu ankaŭ estas konata kiel “Johano Bonamano”. Li estas esperantisto ekde 1989 kaj jam ĉeestis NASK-on, landajn kongresojn en Berkeley (Kalifornio), Hartford (Konek-

tikuto), Sankta Luiso (Misurio) kaj Vaŝingtono (DK). Li ankaŭ vizitis pasintjare la Universalan Kongreson en Rejkjaviko, Islando. S-ro Goodhand diris, “Estas bonege, ke ekzistas klubo en tiu regiono, ĉar, ĝis nun, mi devis veturi al Columbus, Ohio – pli ol 100 mejlojn for.”

La grupo ankoraŭ ne elektis formalan Esperantan nomon, sed estas provizore konata kiel “Toledo Area Esperanto Association.” Sinjoro Hunt volas instrui pluan enkondukan kurson en Septembro, kaj esperas ke la grupo daŭre kreskos. Por disvastigi informojn pri Esperanto kaj pri la klubo, li okazigos kunsidojn kun lokaj gazetoj.



Membroj de la nova grupo ludas Skrablon ĉe sia unua kunveno. (Foto de Warren HUNT.)

## Informo por veganoj

de Arlyn KERR

Viktorio estas bonega loko por veganoj. Se vi ja estas vegano, aŭ vegetarano, aŭ simple ŝatus provi tian kuiradon, jen la nomoj de kelkaj elektoj. Estas pluraj en la urbocentro de Viktorio, sed la plej proksima estas atingebla piede, nur 15 minutojn for laŭ la strato *Sinclair*:

**Thai Lemongrass**  
3838 Cadboro Bay Rd.  
250-385-3838

**Lotus Pond**  
617 Johnson St  
250-380-9293

Kaj jen kelkaj aliaj:

**Cafe Bliss**  
556 Pandora Ave  
250-590-5733

**Green Cuisine**  
5-560 Johnson St  
250-385-1809

Por pli da detaloj (ekz. horoj), kaj por pliaj restoracioj kaj vendejoj, vidu <<http://happycow.net>> kaj serĉu “Victoria B.C.”. Se vi ŝatus iri grupe al vegana restoracio dum via restado ĉe NASK, kontaktu min, Arlyn KERR, kaj mi provos aranĝi tion.